

STIFTO

199


El la enhavo:

Pri Eŭropa Jaro de Lingvoj
Festivalo en Ústí
Somera Esperanto-Tendaroj
100 jaroj de EK Brno
Paroliga kurso + Ekzamenoj
Esperanta-germana vortaro
Helpo por blindulino
OSIEK Strážnice
Konferenco en Poděbrady

2

2001

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Gratulon al patro Xaver

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, 4-foje jare. Abono 9 eŭroj (+ 2 eŭroj aerpoŝte), **rete Starto:** starto@clavis.cz, www.clavis.cz/starto, **rete ĈEA:** cea.polnický@quick.cz (sekretario) podhradská@volny.cz (prezidanto) www.kuk.cz/cea/

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, triobla reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 200 Kč, B 100 Kč, D 50 Kč, E 50 Kč, F 4000 Kč, G 130 Kč (Starto), N 25 Kč, eksterlandanoj 12 eŭroj, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: 500 Kč komencantoj, 500 Kč progresintoj. Aliĝoj: Jana Melichárková, Polní 936, 696 02 Ratíškovice, melicharkova@quick.cz

Libroservo: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha, tel. 02/5817732, m.pluharova@worldonline.cz

Sekcioj de ĈEA: junulara, skolta, pedagogia, katolika, kristana, blindula, medicina, fervojista, ŝakista, SAT-amikara, de esperantaj-kolektantoj, pri informatiko

Komisionoj de ĈEA: ekzamena, gazetara-informa

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz

IĈO de ĈEA: 00 44 30 34

Banko-konto de ĈEA:

3330-021/0100, Komerční banka Poděbrady

ISSN 1212-009X

Komitato de ĈEA:

Prezidantino: Věra Podhradská, Poříčí 1, 603 00 Brno, tel. 05/4323 3047, podhradská@volny.cz (eksteraj rilatoj, honoraj membroj, E-muzeo)

Vicprezidanto: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 02/9912201, fakso 02/9912126 chrdle@kava-pech.cz, (eldonado, UEA, subvencioj)

Vicprezidanto: Jan Řepa, Na Valše 250, 384 11 Netolice (sekcioj), e-mail: repasyn@iol.cz, tel. 0338/324 287, 0602 800214

Sekretario: Pavel Polnický, Lesní 150/VI, 290 01 Poděbrady, tel./fax.. 0324/615651, cea.polnický@quick.cz (kontakto, membrobazo)

Kasisto: Jindřich Ondráček, Bubenská 17, 170 00 Praha (konferencioj, seminarioj), tel. 02/879386

Komitatano: Zdeněk Heiser, Na Nábřeží 45/25, 736 01 Havířov-Město, tel. 069/6815253 (EK, kulturo)

Komitatano-ĉefdelegito de UEA: Lucie Karešová, Tylova 1262, 508 01 Hořice v Podkrkonoší (protokolado, junulara sekcio)

Kontrolgrupo de ĈEA: Josef Hron, Bohdanečská 68, 530 09 Pardubice, Libuše Krejčí, Školní 693, 789 61 Bludov

Redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 05/4724 0690 (nesignitaj artikoloj estas liaj), starto@clavis.cz

Lingva kontrolo: Miloslav Pastrňák
Esperanto-muzeo: Jiří Pištora, Městské muzeum, Staré nám. 78, 560 02 Česká Třebová

Abonoj de gazetoj: Vladislav Hasala, A. Dvořáka 1, 696 62 Strážnice, tel. 0631/332 278, fakso 0631/332 507, vlada_hasala@iol.cz

EŬROPA JARO DE LINGVOJ

Kion atendi de instancoj?

Al la Eŭropa Jaro de Lingvoj dediĉas UEA sian atenton. Tamen ni ne atendu multon de la internaciaj instancoj kiel Unuiĝintaj Nacioj, Unesko, Eŭropa Parlamento, nek de landaj ministerioj pri instruado. Ili ne scias Esperanton, kaj ne kapablas esperantigi eĉ proprajn rezoluciojn favore al Esperanto, tiom malpli verki lernolibrojn kaj vortarojn, traduki beletron, fakajn verkojn aŭ proprajn oficialajn dokumentojn. Se ili decidus subteni nian movadon, ĉion ĉi ili postulus de ni, esperantistoj. Ilia subteno povus esti nur morala kaj financa, sed ne lingva.

Serioza lingva laboro

Serioza lingva laboro postulas sidi ĉiutage ĉe skribotablo aŭ komputilo kaj kelkajn horojn labori. Se oni eltenos tion dum pluraj monatoj kaj jaroj, oni povas atingi certan rezulton, ekzemple vortaron, romanon aŭ lernolibron pri geografio. Neniu mono nek institucio povas anstataŭigi tiun laboron. Nia movado bezonas multe pli tute normalan homan diligentecon kaj laboremon ol monon aŭ oficialan subtenon.

Kion alportus oficialigo?

Oficialigo de Esperanto ne signifus, ke instancoj transprenus nian laboron kaj ke ni povus fine libere elspiri kaj nur ĝui gloron de pioniroj. Male, oficialigo signifus centoble pli grandan ŝarĝon sur niaj ŝultroj. Ĉar se ni ne kapablas esperantigi ĉion necesan, la oficialigo finiĝus per skandala fiasko.

Kial Eŭropanoj ne lernas E-on?

Sed eĉ sen oficiala subteno povas ĉiu Eŭropano lerni Esperanton, kiam ajn li aŭ ŝi ekdeziras, ĉar lerniloj por komencantoj estas sufiĉaj. Tamen en demokratia socio eĉ oficialigo ne povus la lingvon al la homoj trudi. Sola vojo estas fari Esperanton tiel interesa kaj alloga, ke la homoj mem deziru ĝin lerni.

Disvastigado aŭ utiligado?

La pli granda parto de esperantistaro opinias disvastigadon de Esperanto pli grava ol utiligadon, eĉ multe pli grava. Ilia cerbumado koncentriĝas al demando, per kia artifiko varbi milionojn da eksteruloj. Logika sekvo de tia sinteno estas, ke ebloj de praktika uzado de Esperanto estas minimumaj, varbita unuopulo ne scias, kion fari per sia nova scio, kaj perdas iluziojn. Nia movado

estas por la celataj milionoj ne alloga, male eĉ forpuŝa.

Baza tasko de komunikado

Nia deziro disvastigi Esperanton ne povas ŝanĝi simplan fakton, ke baza tasko de ĉiu lingvo ne estas varbado de novaj parolantoj, sed servado al la jam ekzistantaj parolantoj. Ke baza tasko de la internacia komunikado ne estas venkigi unu lingvon super la aliaj, sed interŝanĝi informojn inter homoj kaj landoj. Se Esperanto bone funkcias interne de Esperantujo, aliaj homoj deziros eniri ankaŭ. Sed al Balbutujo, interesiĝanta sole pri propagandado, milionoj da eksteruloj ne rapidos.

Estas same kiel kun aliaj inventoj. Produktanto de kudromaŝinoj deziros vendi milionojn da pecoj, tamen la baza tasko de kudromaŝino ne estas vendiĝi, sed kudri. Necesas pensi pri unuopa virino, kiu aĉetos la maŝinon, alportos ĝin hejmen kaj provos kudri. Se ŝi estos kontenta, pli kontenta ol najbarino, kiu aĉetis maŝinon de konkurenca firmao, la bazo por sukcesa reklamo estas starigita. Sed se la produktanto koncentros sian atenton al milionoj da varbotaj klientinoj kaj klopodos perfektigi la reklamon anstataŭ la maŝinon, la kvalito de lia maŝino

nature postrestos post la konkurenco kaj li perdos la merkaton.

Pensi pri homo, ne pri la homaro

Ankaŭ Esperanto progresos, kiam ni pensos antaŭ ĉio pri kontento de unuopulo, kiu ellernis la lingvon kaj volas ĝin utiligi. Anstataŭ cerbumi, kiel allogi novulojn, ni cerbumu, kiel disponigi al varbitoj la tutan Esperanto-kulturon. La kulturo en plej larĝa senco signifas por lingvoj la samon, kion reto da ŝoseoj por aŭtomobiloj. Sen ŝoseoj estus la aŭtomobiloj ne vendeblaj. Ankaŭ lingvo sen riĉa kaj facile alirebla kulturo estas senŝanca.

Ne atendi helpon, sed mem helpi

La Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 mencias kiel sian unuan celon *konservi la lingvan kulturan heredaĵon* de Eŭropo, precipe de malgrandaj nacioj kaj minoritatoj, kiuj estas plej multe endanĝerigitaj. Due *studi ankaŭ tiujn lingvojn* kaj trie kutimiĝi al la *tutviva studado de lingvoj*. La kampanjo do ne celas subteni internaciajn lingvojn, sekve ni ne atendu subtenon de Esperanto. Male, estas nia tasko pruvi, ke Esperanto povas servi ankaŭ al la kulturoj de aliaj lingvoj.

estas por la celataj milionoj ne alloga, male eĉ forpuŝa.

Baza tasko de komunikado

Nia deziro disvastigi Esperanton ne povas ŝanĝi simplan fakton, ke baza tasko de ĉiu lingvo ne estas varbado de novaj parolantoj, sed servado al la jam ekzistantaj parolantoj. Ke baza tasko de la internacia komunikado ne estas venkigi unu lingvon super la aliaj, sed interŝanĝi informojn inter homoj kaj landoj. Se Esperanto bone funkcios interne de Esperantujo, aliaj homoj deziras eniri ankaŭ. Sed al Balbutujo, interesiĝanta sole pri propagandado, milionoj da eksteruloj ne rapidos.

Estas same kiel kun aliaj inventoj. Produktanto de kudromaŝinoj deziras vendi milionojn da pecoj, tamen la baza tasko de kudromaŝino ne estas vendiĝi, sed kudri. Necesas pensi pri unuopa virino, kiu aĉetos la maŝinon, alportos ĝin hejmen kaj provos kudri. Se ŝi estos kontenta, pli kontenta ol najbarino, kiu aĉetis maŝinon de konkurenca firmao, la bazo por sukcesa reklamo estas starigita. Sed se la produktanto koncentros sian atenton al milionoj da varbotaj klientoj kaj klopodos perfektigi la reklamon anstataŭ la maŝinon, la kvalito de lia maŝino

nature postrestos post la konkurenco kaj li perdos la merkaton.

Pensi pri homo, ne pri la homaro

Ankaŭ Esperanto progresos, kiam ni pensos antaŭ ĉio pri kontento de unuopulo, kiu ellernis la lingvon kaj volas ĝin utiligi. Anstataŭ cerbumi, kiel allogi novulojn, ni cerbumu, kiel disponigi al varbitoj la tutan Esperanto-kulturon. La kulturo en plej larĝa senco signifas por lingvoj la samon, kion reto da ŝoseoj por aŭtomobiloj. Sen ŝoseoj estus la aŭtomobiloj ne vendeblaj. Ankaŭ lingvo sen riĉa kaj facile alirebla kulturo estas senŝanca.

Ne atendi helpon, sed mem helpi

La Eŭropa Jaro de Lingvoj 2001 mencias kiel sian unuan celon *konservi la lingvan kulturan heredaĵon* de Eŭropo, precipe de malgrandaj nacioj kaj minoritatoj, kiuj estas plej multe endanĝerigitaj. Due *studi ankaŭ tiujn lingvojn* kaj trie kutimiĝi al la *tutviva studado de lingvoj*. La kampanjo do ne celas subteni internaciajn lingvojn, sekve ni ne atendu subtenon de Esperanto. Male, estas nia tasko pruvi, ke Esperanto povas servi ankaŭ al la kulturoj de aliaj lingvoj.

SEBRANICE

La nunjara jubilea, laŭvice la 20-a (IKUE) Katolika Esperanto-Tendaro okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2001 en Sebranice en Ĉeĥa Respubliko. Ni invitas ĉiujn, ne nur la katolikajn esperantistojn, travivi unu semajnon de libertempo aŭ ferioj en bela naturo kaj ankoraŭ pli bela amikeca medio. Krom pli-perfektigo en lingvouzo de Esperanto, ni proponas korpan refreŝiĝon kun banado en proksima banbaseno, interesajn programojn precipe ĉe tendara fajro kaj ankaŭ belajn spiritajn travivaĵojn. Pluajn informojn kaj aliĝilojn volonte disponigos al vi la IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA, Tršická ul. 6, CZ-751 27 Penčice aŭ retadrese: msvacek@iol.cz.

NEKVASOVY 2001

Jam la 10-an Refreŝigan Esperanto-Tendaron en vilaĝo Nekvasovy preparas Esperanto-klubo en Plzeň en la tagoj 19.8. (dimanĉo) - 29.8. (merkredo) - eblas partopreni ankaŭ malpli longe, sed ĉiam necesas aliĝi antaŭe. En la turisma tranoktejo de sporta klubo "TJ Jiskra" estas 6- kaj 7-litaj ĉambroj (por 15-20 personoj sume), kuirejo, klubejo-maĝejo,

banejo kun duŝoj, post la domo sportejo kaj proksime naĝejo. Maĝo trifoje tage, plie vendejo kun vafloj, limonadoj, kafo k.s. Konversaciaj rondoj, lingvaj ludoj, sportado, ekskursoj. Unua tago kostas 150 Kč (190 Sk, 9 DEM), ĉiu plua tago 145 Kč (180 Sk, 8,5 DEM). La vilaĝo situas ĉe la fervojtrako No 190 Plzeň-České Budějovice inter rapidstacioj Nepomuk kaj Pačejov (respektive Horažďovice).

Aliĝojn sendu al s-ro Jiří Vomáčka, Koterovská 30, 326 00 Plzeň, Ĉeĥio.



2-a E-MENTAL'

okazis 1.-3.6.2001 en Meziříčko, proksime de Velké Meziříčí. Eksjunularaj (eks-)esperantistoj kun familianoj renkontiĝis jam la duan fojon, ĉifoje por *Aventura ekspedicio por akiri vivan kaj mortan akvon*. En la programo estis ankaŭ preparo por la ekspedicio, sportado aŭ pigrado, ekskursoj kaj olimpikoj. Pri E-mental' ni raportis en Starto 3/2000, p. 20. Informojn petu ĉe Pavla Dvořáková, Ostravská 637, 199 00 Praha 9 (02/6282952).

14-a Internacia kultura festivalo

de la 28-a ĝis la 30-a de septembro
2001 en Ústí nad Labem
dediĉota jam tradicie al la
rememoro de ĉeĥaj esp. verkistoj
Jiří Kořínek kaj D-ro Tomáš
Pumpř

Akceptejo en saloneto en la unua
etaĝo de la hotelo Palace, kie okazos
ankaŭ interkona vespero kaj man-
ĝoj.

Prelega kaj diskuta matineo
atendas vin en Malgranda Scenejo
de Domo de Kulturo, strato Velká
Hradební 19. Jam tradicia homaran-
isma spirita koncerto en Ruĝa
Preĝejo (14.30 h) kaj solena kultura
vespero (muzika, kanta, deklama)
denove en Malgranda Scenejo.

Dimanĉe vin atendas surpriza
ekskurso.

Unu nokto en Sporthalo kostas
100 Kč, en Hotelo Palace 320 Kč,
maten-, tag- kaj vespermanĝoj po 50
Kč. Aliĝojn akceptas:

S-ro

Miroslav Smyčka

Kojetická 90

CZ-400 03 Ústí na Labem

tel. 047-553 2417

49-a Esperanto-Tendaro Lančov

Nia plej tradicia tendaro proponas
ĉijare apud la kursoj de Esperanto
kaj aliaj lingvoj (angla, germana,
franca, rusa) ankaŭ kursojn de
kuracmetodo REIKI kaj por infanoj
kurson de pentrado kaj lignoskul-
ptado sub gvido de Josef Kremláček.

Loĝado en kabanoj 4- aŭ 5-litaj,
manĝo 5-foje tage. Antaŭtagmeze
instruado, posttagmeze sportado,
ekskursado, vespere tendarfajroj,
diskotekoj, ludoj.

Etapoj:

- 1.7.-14.7. Esperanto, angla, germana
- 15.7.-28.7. Esperanto, angla,
germana, franca, rusa
- 29.7.-11.8. Esperanto, angla,
germana, pentrado-skulptado

La kursoj de REIKI:

- 15.7.-21.7. la 1-a grado
- 22.7.-28.7. la 2-a grado

Renkontiĝo de malnovaj tendaranoj

okazos en la tendaro
la 10-an de aŭgusto 2001.

La tendaron prizorgas kaj aliĝojn
akceptas:

ESPERANTO, 674 01 Třebíč

Oldřich Schwetter

Se vi povas, helpu!

(Preskaŭ nevidantino petas vian helpon)

Antaŭ multaj jaroj mi laboris kiel juna instruisto en okjara mezlernejo en Dolní Bludovice (tiam distrikto Český Těšín, nun distrikto Karviná kaj urboparto de Havířov). Kiam mi fondis en la lernejo E-rondeton, aliĝis ankaŭ lernantino Jindra kaj lernis Esperanton. Post kelke da tempo ŝi ricevis de mi adreson de Harukuni el Japanio kaj ilia korespondado komenciĝis.

S-ano Harukuni skribis leterojn tre interesajn kaj riĉenhavajn, plie li sendadis al Jindra multe da donacoj, kiujn mi uzadis por propagandi Esperanton (la plej interesaj estis japana kimono, japanaj sandaloj nomataj "getaĵoj" kaj sonbendo kun lia E-voĉo). Ilia korespondado daŭris longe, ili reciproke enamiĝis. Malgraŭ tio la korespondado ĉesis.

Pasintjare skribis al mi s-anino J. Drahotová el Mladá Boleslav demandon, ĉu mi hazarde konas iun Jindra el Dolní Bludovice, ke ŝia iama korespondanto el Japanujo, samideano Harukuni, serĉas ŝin.

Mi eltrovis, ke Jindra fariĝis instruistino kaj instruas en la lernejo

Dolní Bludovice (kiun ŝi vizitadis estinte lernantino). Tie mi eksciis, ke ŝi nun ne laboras, ĉar ŝi havis akcidenton. La lernejdirektoro donis al mi ŝian adreson kun telefonnumero, kaj mi vizitis ŝin.

Atendis min granda nekredebla teruro, kiam Jindra rakontis pri la akcidento: En banĉambro ŝi volis pendigi tolaĵon. Ŝi supreniris sur randon de banujo, glitfalis kaj ŝia vertebraro rompiĝis (!!!). Dank' al Dio ŝi transvivis, sed tri monatojn ŝi kuŝis senmove en ĝipsbandaĝo kun grandaj doloroj.

Interalie ŝi diris, ke ŝi volus relerni Esperanton, sed pluraj sanproblemoj kaj doloroj ne ebligis tion. Venis ankaŭ nova problemo - problemo kun okuloj, **glaŭkomo** (!!!). Ŝi nun malbone vidas, ne povas skribi, eĉ legi.

Do, karaj gesamideanoj, tio estas granda tragedio por Jindra, sed mi opinias, ke ni povus helpi ŝin. Eble ekzistas iu sonbenda E-kurso por preskaŭ nevidantoj kun klarigoj en la ĉeĥa lingvo. Se vi scias ion, skribu aŭ telefonu al mi. Eble iu el vi jam instruis preskaŭ nevidanton, bonvolu sciigi al mi viajn spertojn.

Oldřich Schwetter, Sadová 7, 736 01 Havířov - Město, tel. 069/6810548, poŝ-telefono 0606 350777

La Granda Vortaro Esperanto - Germana

Krause, Erich-Dieter (1999):

*Großes Wörterbuch Esperanto-Deutsch.
Hamburg: Helmut Buske Verlag, IVX +
882 p., ISBN 3-87548-193-3, fortika
bindaĵo, 19x12 cm*

La ĝis nun supozeble plej granda iam ajn eldonita vortaro Esperanto-nacia lingvo aperis en 1999. La prestiĝa lingvistika eldono Helmut Buske Verlag Hamburg aperigis la vortaregon. La 882-paĝa, klarlitere kaj dense presita vortaro enhavas pli ol 80 000 artikolojn kaj lingvajn esprimojn en Esperanto kun siaj germanaj ekvivalentoj. La vortaro havas dulingvajn antaŭparolojn (germana, Esperanto), instrukciojn pri la uzo de la vortaro, listojn de mallongigoj kaj uzita literaturo. La lingva materialo konsiderinde superas tiun de la Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto (PIV).

Mi faris nur tute supraĵajn unuajn komparojn kaj rigardis la kvanton de la registritaj vortkunmetaĵoj ĉe Krause kaj en PIV:

	PIV (1970)	Krause (1999)
akvo	34	99
infano	19	37
mano	26	56
labori	46	82

lerni	24	27
tiri	41	43
afabla	4	6
granda	24	43
nova	15	29

La Vortaro ne nur registras la ĉiutagan lingvon, sed ankaŭ prezentas multan faklingvan materialon el plej diversaj sciencaj kampoj. La vortaro sendube estas utilega ankaŭ por nekonantoj de la germana lingvo.

La aŭtoro estas unu el la malmultaj profesie trejnitaj leksikografoj, pri kiuj disponas la esperanta lingvo-komunumo. Li estis profesoro pri indonezia lingvo ĉe la Universitato de Leipzig, membras en la Akademio de Esperanto. Li verkis i.a. ampleksan vortaron Germana-Esperanto kun pli ol 40 000 artikolovortoj, kiu haveblas ĉe la eldono Langenscheidt, krome grandajn vortarojn por la indonezia lingvo.

La nova libro estas havebla kontraŭ ĉ. 78 markoj (ĉ. 39 eŭroj) ĉe UEA aŭ aliaj libroservoj. Oni ankaŭ povas rekte mendi ĉe la eldono, kiu liveras en ĉiujn angulojn de la mondo: Helmut Buske Verlag, Richardstr. 47, DE-22081 Hamburg, retadreso: buskepubl@aol.com

Detlev Blanke

Ekspozicio kun konkurso de infandeseĝnaĵoj el la tuta mondo

Okaze de la unua Tago de Infanoj en la tria jarmilo kaj Eŭropa Jaro de la Lingvoj preparas Esperanto-rondeto ĉe Urba Kulturcentro en urbo Vyškov (CZ) ekspozicion de infan-deseĝnaĵoj el la tuta mondo kunligitan kun konkurso, kiu okazos de la 9-a ĝis la 16-a de septembro 2001. Temo de la deseĝnaĵoj estas MIA HEJMO. Povas temi pri via familio, loĝloko, urbo aŭ vilaĝo, en kiu vi vivas, kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, regiono aŭ via lando. Por la deseĝnaĵoj estos tri kategorioj laŭ aĝo de iliaj aŭtoroj: ĝis 8 jaroj, 8-14 kaj 14-18 jaroj. Dorsflanke skribu nomon, naskiĝdaton, adreson kaj nomon de la deseĝnaĵo. Rekomendinda estas partopreno de infanoj el klasoj de Kvazaŭlernejo de Tibor Sekelj. Deseĝnaĵojn prijuĝos vizitantoj de la ekspozicio, aparte infanoj kaj plenkreskuloj kaj faka ĵurio. Ĉiu partoprenanto ricevos memordiplomon, la aŭtoroj de la plej belaj tri verkoj en ĉiu kategorio premion. Formato de deseĝnaĵoj ne estas limigita. Konkursaĵojn sendu (prefere ruligitajn) tiel, ke ili venu ĝis fino de aŭgusto al la adreso: Esperanto-rondeto, MKS, Jana Šoupala 4, CZ-682 01 Vyškov. Noto: Mallongigo MKS signifas Urba Kultur-centro. Kontakto perreta por eventualaj demandoj: vojacek@jumbo.ped.muni.cz

KIE ESTAS ZAMENHOF- PORTRETO DE HAVLAS?

En la urbo Poděbrady (Ĉeĥio) loĝis kaj kreis fama ĉeĥa gliptikisto Ladislav Havlas (1907-1988). Gliptiko estas arto gravuri sur gemoj, kristaloj k.s. Ladislav Havlas kreis per tiu tekniko portretojn de eminentaj personoj (Antonín Dvořák, S. K. Neumann, František Lexa, František Kožík, Josef V. Pleva k.a.). En 1983 li kreis por eksterlanda kliento ankaŭ intaglion (= gliptikaĵon) de Ludoviko Lazaro Zamenhof, de kiu konserviĝis nur foto. Por kompletigi informojn pri la tutviva verkaro de la artisto la Ĉeelba Muzeo en Poděbrady bezonas ekscii, por kiu la portreto estis farita, ĉu ĝi ankoraŭ ekzistas kaj kie ĝi troviĝas. La muzeo turniĝas al la esperantistaro kun peto pri iu ajn informo koncernanta la verkon. Vi povas skribi internacilingve, ĉar la subskribinto estas esperantisto.

*Mgr-ino Marie Klára Prchalová,
Polabské muzeum, 290 55 Poděbrady,
Ĉeĥio*



EK Olomouc 90-jara

Esperanto-klubo Olomouc festos la 90-an datrevenon de sia fondo. Ni kore invitas vin al solena kunveno. kiu okazos la 29-an de septembro 2001. Partoprenantoj kolektiĝos je la 10-horo antaŭ la domo N. 8. Horní náměstí, Olomouc - kontraŭ la urba turhorloĝo (restoracio CORSO).

Ostrava-Poruba: En la pasinta jaro 2000, jes, Esperanta klubo en Ostrava-Poruba regule funkciis! La gesamideanoj ĉiusemajne kunvenadis, ligve perfektigadis, ofte vizitadis aranĝojn ekster Ostrava. Kunlabore kun EK Vítkovice la klubo eldonis bildkarton "Saluton el Ostrava", baptitan 5.12.2000 en nia klubejo dum la finjara jarkunveno.

Bapto de bildkarto en Ostrava

EK Ostrava-Vítkovice kunlabore kun EK Poruba eldonis bildkarton de la urbo Ostrava, kie troviĝas ankaŭ Esperantomonumento dediĉita al J. A. Komenský (28.3.1592-15.11.1670). Per ĝi ni volis atentigi la publikon, ke J. A. Komenský jam en 1642 proponis internacian lingvon en libro "Via lucis" (Vojo de la lumo). Ni volis per bildkarto esprimi fakton, ke tia lingvo jam ekzistas kaj servas al interkompreniĝo.

Oficiala bapto okazis 10.1.2001 en klubejo, kie prezidantino Lydie Klegová verŝas bildkarton per slivovico (prunbrando) kaj asistas D. Kočvara kaj L. Tesařová. Eldonon subtenis ĈEA. En la jaro 2002 ni festos 50-jariĝon de Emonumento. Ni intencas kunvoki

renkontiĝon kaj planti al la monumento Esperanto-arbon. Plej konvenus la japana *sakuro*. La bildkarto estas mendebla ĉe Drahomír Kočvara, Hulvácká 18, 700 30 Ostrava.

Freŝa 80-jarulo. Membroj de la Esperanto-klubo LA PONTO en Písek partoprenis diservon omaĝe al okdekjariĝo de dekano Josef Xaver Kobza (27.2.), IKUE-ano. En plenplena preĝejo eksonis Esperanto, kiam Radka Křivánková dankis lin pro lia multjara sindona laboro por la movado. Patro Xaver estis plezurigita, reagis ankaŭ en Esperanto kaj ĉeĥe klarigis al la ĉeestantoj, kio estas la internacia lingvo kaj kiel ĝi riĉigis lian vivon. Fine li ludis la jus donacitan gitaron, kaj kiu sciis, tiu kunkantis.

Klubo LA PONTO

Nova kalendareto de EK Pĕřerov



Unua esperantlingva aŭdo-CD en Ĉeĥio.

Eldonejo Komers, eldonanta astrologiajn librojn de nia klubano, nun, post longa persvadado, decidis eldoni por E-klubo Ostrava-Poruba okdekminutan aŭdo-CD kun 32 kantoj en Esperanto kun kantareto. Kantas kaj muzikas Vlado Sládeček. Marinjo Tomašíková kaj Bohunjo Sládečková. Estis superflua antaŭtimo de la eldonejo, ke la varaĵo estos nevendebla. Tuj post pretigo aperis mendoj el eksterlando, plejparte de neesperantistoj, tial por nia lando restis nur nemultaj pecoj. Kompreneble okdekminuta CD estas sufiĉe multekosta afero. Maturaj esperantistoj dum aŭskultado de la kantoj rememoros ĉiujn belajn renkontigojn, bivakfajrojn, verdan amikecon. Per kantado ni pliriĉigas la kunvenojn de nia klubo.

L. Klegová

Societo K. H. Mácha, kaj Esperanto

Společnost Karla Hynka Máchy eldonis 2-an jarraporton (27 paĝoj A5) kun kvar artikoloj. La lasta, titolita *Dvojí podoba esperantského překladu Máchova Máje* (Du Esperantaj tradukoj de Majo de Mácha) verkita de Vlastimil Kočvara, komparas la tradukojn de Tomáš Pumpr kaj Josef Rumler.

53-a IFEF-kongreso ĉe Ĉeĥa poŝto



En poŝtofiĉejo Strážnice dum la tagoj 02.04-19.05.2001 estas stampata bildeto de lokomotivo tipo 312.3 el jaroj 1868-71 laŭ kliŝeto de Ing. Ark. Karel Kuča, gravurita de Karel Pavlíček.

Najado de A. Dvořák en Esperanto

Rara registro de voĉoj de Karel Höger, Maria Tauberová, Beno Blachut, Karel Kalaš, Bořek Rujan k.a. en Esperanto el la glora tempo de Verda Stacio konserviĝis kaj estis eldonita de (neesperantista!) blindula asocio 1996 okaze de nia Praga UK. La traduko de Tomáš Pumpr aperis sur du kazedoj (300 Kč). Ĝis nun restis ankoraŭ ĉirkaŭ cent pecoj, ĉar el niaj esperantistoj ĝin preskaŭ neniu aĉetis (SONS, Karlínské nám. 12, 186 03 Praha). Estas vere honto, ke mil esperantistoj ne kapablas aĉeti tian rarajon kun la voĉo de niaj majstroj el Nacia Teatro, kaj tiel liberigi la blokitan monon por niaj nevidantaj kuncivitanoj.

Speciale interesaj estas komentoj inter unuopaj arioj, ĉar tiujn legas unu el niaj plej grandaj aktoroj kaj verŝajne plej bona voĉo, kiu iam parolis en Esperanto, K. Höger.

EK Strážnice

Jarkunveno (23.3.2001) en Kulturdomo Strážnican elektis kiel novan kluban prezidanton s-inon Andrea Hasalová (andrea_hslvc@iol.cz), verŝajne plej junan kluban prezidanton en la asocio (25j.). Ŝi samtempe plenumos funkcion de kasis-tino.

Cent jaroj de KE Brno


La solenon, okazintan la 26-an de majo 2001, kun pli ol 100 gastoj, inaŭguris vicurbestro Pavel Kuba, kiu surprizis per siaj scioj pri nia movado. Post parolado de la kluba prezidanto Zdeněk Hršel koncertis deko da gejunuloj sub gvido de operkantistino Helena Halířová-Supová, akompanate de prof. Bitner (elektronika klavaro). Tiu posttagmeze akompanis ankaŭ M. Smyčka. En la antaŭĉambro de la salono en Malnova Urbodomo funkciis libroservo kaj malgranda ekspozicio preparita de Oldřich Arnošt Fischer (kopioj de dokumentoj el 1901 pri fondo de la klubo, rememoro pri Verda Stacio k.s.). La klubo eldonis ankaŭ bildkarton (4 Kč) kaj 28-paĝan broŝuron pri la kluba historio (20 Kč), surbaze de teksto trovita en postlasaĵo de Josef Vondroušek.

EK Znojmo

sukcesis envicigis en Jarlibron de Ŝtata Distrikta Arkivo en Znojmo 2000 artikolon pri la E-movado en la urbo (p. 119-126) kaj unupaĝan informon en germanlingva gazeto Willkommen in Zneim 1/2001, p. 18.

Ĉeĥa Poŝto en Strážnice

stampis ĉiun forsenditan koverton per afrankmaŝino okaze de centjariĝo de Klubo de esperantistoj en Brno (22.-31.5.2001). Ankaŭ ĉi tiun krokodilon desegnis Karel Kuča kaj gravuris Karel Pavlíček.



Ni kondolencas

La 7.1.2001 forpasis sinjorino Marie Deisznerová el Dašice v Čechách (87j.) kaj la 28.2.2001 sinjoro Evžen Belda el Tanvald (87j.).

Korektu pri KE Přerov

Klub esperantistů Přerov, p/a Ludvík Chytil, Drážní 60, 750 02 Přerov-Lověšice, 27 membroj, klubejo: Žerotínovo nám. 4, kunvenoj merkrede 18-20 h.

"ADONIDO " Ratiškovice

De la 20-a ĝis 22-a de aprilo okazis en Ratiškovice la tradicia, jam 10-a ADONIDO. Nunjare pli ol 20 esperantistoj el 10 ĉeĥaj urboj kaj unu partopreninto el Antverpeno jam vendrede partoprenis grandan turniron en kegloludo. La venkintoj el diversaj kategorioj estis premiitaj per marcipanjaj medaloj, kiujn kun multaj aliaj marcipanaĵoj preparis kaj donacis firmao de geedzoj Vyšinka el Vracov. Ĉiuj kegloludistoj post vespermanĝo foriris iomete lacaj, sed tre kontentaj, ĉar multaj ludis unufoje.

Sabate sekvis vizito de belega novrekonstruita kastelo Milotice kun granda ĝardeno kaj poste promeno al Vacenovice. Sed ĉar estis tre malvarme, la adonidoj kaŝis sian belecon kaj la floroj estis fermitaj.

Pro tio la partoprenintoj akceptis inviton de familio Vyšinka al Vracov, kie ĉiuj provis modeloj el marcipano diversajn bestetojn kaj poste prezentis ilin en improvizita ekspozicieto de fabrikitaj marcipanaĵoj kiel katinoj, porketoj kaj hundoj.

Vespere ĉiuj veturis en vinkelon al Ratiškovice ĝui bonan etoson, bonan manĝaĵon, bonan vinon, kantadon kaj babladon.

13-a seminario de AEH en Skokovy.

En tagoj de la 23-a ĝis 29-a de aprilo pli ol 40 personoj partoprenis Esperanto-seminaron en Skokovy. Antaŭtagmeze okazas Esperanto-kursoj sub gvido de spertaj instruistoj. Kiu preferas promeni tra belega, pitoreska pejzaĝo de Ĉeĥa Paradizo, povas partopreni komunan ekskurson. Posttagmeze okazas diversa programo, oni povas lerni interesajn manlaborojn sub gvido de vidartistino Eva Pánková, kiu regule partoprenas la seminariojn. Interesatoj povis posttagmeze gimnastiki per jogo, aliaj uzi belegan naturon kaj promeni, aliaj ripozi aŭ rigardi televidon.

Okazis interesaj prelegoj, ekz. pri Casanova (J. Mráz), pri UEA, pri eldonado de libroj, pri IFEF-kongreso ktp. (D-ro P. Chrdle), eldonado de vortaroj, lingvaj ludoj (Mag. K. Kraft), amuzaj ludoj, video (D. Kočvara).

M. Smyčka en sia koncerto instigis la aŭskultintojn kanti poste preskaŭ ĝis noktomezo. Por la amuza adiaŭa vespero ĉiuj partoprenintoj ion preparis kaj prezentis. La adiaŭo okazis same, kiel adiaŭas parencoj - ĝis revido aŭtune en Skokovy. *V. Podhradská*

La 53-a IFEF kongreso en Tábor

La 53-a kongreso de IFEF (Internacia Fervoĵista Esperantista Federacio) okazis (12.5.-19.5.2001) en la sudbohemia urbo Tábor. Proksimume 170 partoprenantoj el 18 landoj venis ne nur trarigardi belegan historian urbon Tábor kaj ĝian ĉirkaŭaĵon, sed ĉefe trakti dum la kongresaj kunvenoj kaj prelegoj. Post 10 jaroj jam la duan fojon venis fervoĵistoj al Ĉeĥio kaj kun malavara apogo kaj subteno de Ĝenerala Direkcio de Ĉeĥaj Fervojoj (ĈF) kaj landa FISAIC ĝui amu-zajn, kulturajn kaj ekskursajn pro-gramojn. En la stacidomo de Tábor la partoprenantoj povis aŭdi "bonve-non" en Esperanto, ili ricevis kon-gresmaterialojn, kaj lokaj esperan-tistoj akompanis ilin al la loĝejoj.

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis solena inaŭguro de la kongreso en urba teatro de Oskar Nedbal. Sur la podio sidis krom IFEF-estraranoj ankaŭ urbestro de Tábor sinjoro Ĥ. Dědič kaj la unua ĝenerala vicdirektoro de ĈF kaj sekretarioj de landa asocio de FISAIC kaj sindikata asocio de fervoĵistoj. Post salut-

vortoj de landaj reprezentantoj sekvis parto, dum kiu estis nomumitaj novaj honoraj membroj de IFEF kaj precipe publika gratulo al honora membro de IFEF Joachim Giessner el Germanio, kiu partoprenis sian jam 50-an IFEF-kongreson sen interrompo. Posttagmeze okazis la unua faka kunveno kaj poste ekumena diservo en preĝejo de Diaj Batalantoj apartenanta al Ĉeĥoslovaka Husana Eklezio. Vespere ni ĝuis brilan artan koncerton, plej parte kantojn de ĉeĥaj kaj mondfamaj majstroj en Esperanta traduko de Joachim Giessner kaj kantojn de Elena Puchova.

La kongresajn bultenojn preparis V. Podhradská kaj J. Melichárková. La tuttagaj ekskursoj gvidis nin al pitoreskaj lokoj, multaj flegataj de UNESKO, kiel ekzemple Telč, Český Krumlov, Třeboň kaj aliaj, sed realiĝis ankaŭ piedekskurso tra la ĉirkaŭaĵo de Tábor kaj nostalgia trajnveturo al proksima banloko Bechyně.

La kulturajn programojn riĉigis ankaŭ lernantoj de baza arta lernejo, la emsemblo Úsvit (Tagiĝo), kaj dum la balo ludis por la danco emsemblo Keramička.

fili

Jubileo de EK Poděbrady

Antaŭ 90 jaroj estis Esperanto oficiale anoncita en Poděbrady de sinjoro Vojtěch Budínský. Omaĝe al la jubileo estas preparata renkontiĝo kun jena programo:

1.8. Alveturo de partoprenantoj, enloĝigo, dancvespero ĉe blovmuziko en Swiss de Kolonáda, tombolo.

2.8.2001 Akcepto de partoprenantoj ĉe la urbestro, vizito de vitrofarejo "Bohemia". Posttagmeze ekskurso per motorŝipo sur Elbo. Vespero de katedrala muziko en Koruso de la reĝo Georgo, kantas operkantistoj el Ústí n. L.

3.8.2001 Inaŭguro de ekspozicio "90 jaroj de Esperanto en Poděbrady" kaj senvualigo de memortabuloj sur Ĉeelba muzeo. Vespero en nove rekonstruita teatro "En Forĝejo".

4.8.2001 Vizito de folkloro de Poděbrady. Posttagmeze koncerto de blovmuziko "Ĝojo" sub gvido de O. Danda en parko. Ekde la 9-a horo la 16-a renkontiĝo de esperantistoj-ŝakistoj.

5.8.2001 Ekskurso al Libice nad Cidlinou kaj al kunfluiĝo de Elbo kun Cidlina. Komuna tagmanĝo. Por kvar kuraĝuloj vetmanĝado de kuko pri "Arĝenta talero". Trans-

dono de suveniroj al la plej aĝa, plej malproksima kaj plej juna partoprenanto. Komuna fotografado.

POR LA KORON KARESADI
VENU AL PODĚBRADY

Láďa Fiala

37-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (7-15-an de julio 2001)

okazas ĉijare en universitata urbeto de Litovia Agrikultura Universitato kelkajn kilometrojn for de Kaunas. Esperantistoj estas invitataj por studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn, enhavoriĉe pasigi la tempon (paroliĝaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj vesperoj, kvizoj, pupteatroj, diskutado, ripozado en naturo ktp.). Aliĝkotizo por ekssocialismaj landoj 40 lidoj (10 USD). Unu nokto en tranoktejo varias inter 20 ĝis 60 lidoj (5-15 USD).

Kontakt-adreso:

p.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio,
Litova Esperanto-Asocio. La asocio
havas sidejon en str. L. Zamenhof 5.
Telefakso: 370-7-228616, ret-poŝto:
ritavalc@takas.lt

Automobilem - příjezd od Prahy (sjezd z dálnice Poděbrady - západ), od Mladé Boleslavi a od Kolína - příjezd do města po mostě přes Labe, na náměstí odbočit vlevo a jet Husovou ulicí, vlevo mĳíte lázeňský dům MĪR, potom vpravo parčík a za nĳm odbočíte doprava do Boučkovy ulice, jedete až k zemědělské škole (vlevo v zahradě) a za ní je Domov mládeže od Hradce Králové a Jičína - na náměstí odbočit vpravo (nejet na most) a dále - viz výše.

Během konference budete mít možnost zakoupit si esperantské knihy a další zboží ze zásob LIBROSERVA ČES, které bude výhradním prodejcem. Pokud chcete nabídnout k prodeji svoje esp. předmety nebo výrobky, pak jedině jeho prostřednictvím. Neesperantské zboží pouze se souhlasem výboru ČES.

Na místě bude možnost zaplatit si členské příspěvky ČES, UEA, sekcí a předplatné esp. časopisů - **POČÍTEJTE S TĪM !!!**

ŪHRADA za konferenci je možná těmito způsoby:

a) složením příslušné částky v pokladně kterékoliv pobočky Komerční banky a.s. na účet ČES u Komerční banky v Poděbradech č.ú. 3330 - 021/0100, variabilní symbol 10008, konstantní symbol 0308. Nezapomeňte na pokladní složenice KB (viz vzor ve Startu č. 2/01) uvést své jméno a příjmení. Vklad je bez poplatku.

b) bezhotovostním převodem z Vašeho účtu - nezapomeňte uvést čísla obou symbolů a na přihlášce číslo účtu, ze kterého platíte!!

PŘIHLÁŠKY pošlejte nejpozději do 20. září 2001 (rozhoduje datum pošt. razítka) na adresu svazu:

Český esperantský svaz, c/o Pavel Polnický, Lesní 150/VI., 290 01 Poděbrady. Možno i faxovat (0324/6156 51) nebo použít E-mail: **cea.polnický@quick.cz**

Stornovací poplatky: při odhlášení do 5. října 2001 (dle poštovního razítka) Vám bude odečteno 10 % ze zaplacené částky na nezbytné náklady, po tomto termínu 50%!

Těšíme se na shledanou v Poděbradech
Věra Podhradská v.r.
předsedkyně ČES

Závazná přihláška na 8. konferenci ČES

Poděbrady 19.-21. října 2001

Příjmení:	Jméno:	Titul:
Adresa vč. PSČ		
telefon vč. předčíslí		E-mail
rok narození:	číslo OP (pro ubytování):	
číslo člen. průkazu ČES	vegetarián <input type="checkbox"/> ano <input type="checkbox"/> ne	

Přihlašuji se závazně na 8. konferenci ČES. Prohlašuji, že jsem si pozorně přečetl(a) pozvánku a souhlasím s podmínkami pořadatele. **Objednávku služeb uvádím na rubu této přihlášky.**

Způsob úhrady (zakřížkujte jednu možnost):

- složeno v Komerční bance a.s. dne
- uhrazeno bezhotovostně z mého účtu číslo dne

Objednávám následující:

Kompletní služby - 2x nocleh, 2x plná penze

Účastnický poplatek

člen ČES, platba	do 20. 9. 2001
	po 20. 9. 2001

členové do 30 let	do 20. 9. 2001
a nevidomí	po 20. 9. 2001

nečlen ČES, platba	do 20. 9. 2001
	po 20. 9. 2001

čestní členové ČES a pozvaní hosté

Dar svazu

Celkem k úhradě

Poznámka

Datum

(zakřížkujte žádané)

Kč 660,- ano ne

Kč 150,- ano ne

Kč 250,- ano ne

bez poplatku ano ne

Kč 150,- ano ne

Kč 250,- ano ne

Kč 350,- ano ne

bez poplatku ano ne

..... Kč

..... Kč

.....
Podpis

INTERNACIA ESPERANTO-KONFERENCO Strážnice, Ĉeĥio, 14a-20a de julio 2001

Karolo PIC kaj liaj mondoj

Voĉdonado por OSIEK-premio Postkonferencaj ekskursoj dum 3 tagoj

E. Laubacher, 1 rue Bougainville
78180 Montigny-le-B., Francio
tel. +33 (0) 130 96 67 91
ret. eric@iname.com

V. Hasala, sala, pk 36, 69662 Straznice
tel. +420 631 332 278
ret. vlada_hasala@iol.cz



http:
//osiek.org

ALVOKO AL FILATELISTOJ

Antaŭ la solena malfermo de la 14-a Internacia Esperanto-Konferenco (IEK) organizita per Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj (OSIEK) en Strážnice en la tagoj de la 14-a ĝis la 20-a de julio 2001 efektiviĝos la renkontiĝo de la partoprenantoj de IEK kun filatelistoj kaj aliaj kolektantoj el Ĉeĥio.

La renkontiĝo estas la 14-an de julio 2001 posttagmeze en Kultura Domo Strážničan en Strážnice. La renkontiĝo estos sub aŭspicio de Esperanto-Sekcio ĉe Asocio de Ĉeĥaj Filatelistoj.

La organizantoj de IEK kore invitas ĉiujn interesigantojn el Ĉeĥio kaj el najbaraj landoj partopreni la renkontiĝon!

La partoprenantoj havos eblecon renkontiĝi kaj konatiĝi kun gepartoprenantoj de IEK kaj eventuale kun kolektantoj el aliaj landoj kaj eble interkonsenti ankaŭ utilajn interŝanĝamikecojn. Ankaŭ vendi, aĉeti aŭ

interŝanĝi diversajn filatelaĵojn kaj aliajn kolekt-objektojn.

Dum la renkontiĝo funkcios poŝta ĝiĉeto kaj al dispono por kolektantoj estos la afrank-maŝinstampilo laŭ propono de inĝ. Ark. Karel Kuča el Prago, kiu estis farita speciale al la 14-a IEK en Strážnice. La loka poŝtofiĉejo uzas ĝin jam ekde novembro 2000, same kiel R-surgluojn kun teksto "14-a IEK de OSIEK 14-20.7.2001", kiuj estas oficiale uzataj jam ekde januaro 2001.

Kunlaboro OSIEK-ĈEA

La 31-an de marto 2001 efektiviĝis komuna kunveno de la organiza skipo IEK kun ĈEA-estraro en Ratíškovice. La kontrakton pri kunlaboro subskribis Věra Podhradská kiel prezidantino de ĈEA kaj Vladislav Hasala nome de organiza skipo de OSIEK. Věra Podhradská kun D-ro Petr Chrdle kaj Miroslav Malovec partoprenos la konferencon, la lasta kiel instruanto kaj preleganto.

Pasporta Servo 2001

Pasporta Servo estas unika servo de Esperanto-parolantoj. Per ĝi vi trovas ne nur senpagan tranoktadon en aliaj landoj dum via persona turismado, sed ankaŭ amikajn esperantistojn, kun kiuj vi povas praktiki la lingvon, kiuj diskutos kun vi pri plej diversaj aferoj kaj kiuj povas rekomendi al vi diversajn aventurojn en iliaj landoj.

Per Pasporta Servo vi ne trovas hotelon, sed vi havas unikan ŝancon eniri familian etoson kaj alian kulturon.

En ĉi-jara listo vi trovas 1161 gastigantojn en 80 landoj. Atentu, ke sen freŝa Pasporta Servo vi morale ne rajtas peti gastigadon.

La broŝuro kostas 120,- Kč plus sendokostoj (laŭ poŝt-tarifo) kaj eblas mendi ĝin ĉe Libroservo de ĈEA: Zdeněk Pluhař, Lamačova 658/6, 152 00 Praha. Ni havas nur limigitan kvanton de broŝuroj.

UEA KANDIDATIGITA POR LA PACPREMIO DE NOBEL

Universala Esperanto-Asocio estas kandidato por la ĉi-jara Pacpremio de Nobel. Laŭ provizoraj informoj, UEA estis kandidatigita de membroj de registaroj aŭ parlamentoj alme-

naŭ el Francio, Korea Respubliko, Kroatio kaj Litovio, kaj de proponrajtaj universitataj profesoroj almenaŭ el Ĉeĥio, Hispanio, Korea Respubliko, Kroatio kaj Usono.

*

18-a Internacia Festivalo en Magdeburg

(27 dec 2001 - 3 jan 2002)

Internaciaj Festivaloj, precipe por mezaĝuloj (25-55 j.) kaj iliaj familianoj, jam fariĝis tradiciaj kaj apartenas al la plej sukcesaj aranĝoj en Esperantujo. Samtempe, sed aliloke okazos junulara Internacia Seminario. La lasta IF realiĝis en la germana Trier (27.12.2000-3.1.2001) kun ĉeftemo "Esperanto kaj infanoj". La magdeburga festivalo havos ĉeftemon "Unu mondo - kvin kontinentoj" aŭ ĉu la Interreto kun la angla jam kreis "tutmondan vilaĝon"? La partoprenantoj bonvenigos Esperanta gastejo "KNAJPO". Kotizo 260 - 290 EUR (laŭ dato de pagado).

Aliĝojn akceptas Hans-Dieter PLATZ, Postfach 1148, DE-34303 Niedenstein, Germanio,

HDP@internacia-festivalo.de,
ww.internacia-festivalo.de.

Lingvaj ludoj kaj enigmoj (6)

Solvoj de la rebusoj el la antaŭa numero:

8. oka jaro
9. sekundo
10. kordo murmura

Nova enigmo, kiun ni hodiaŭ pritraktos estas

DUSENCAĴO

Se ni iun vorton aŭ grupeton da vortoj alimaniere dispartigos, ni ricevos same sonantan vorton aŭ vortgrupon kun tute alia signifo. En la propono ambaŭ divenaĵoj estas sufloritaj aŭ per difinoj aŭ per sinonimoj. La formo povas esti enskriba (sur punktojn aŭ streketojn). Ofte la enigmo aspektas kiel kontinua teksteto aŭ rimajo, en kiu la sinonimoj estas okulfrape signitaj.

Kelkaj solvitaj ekzemploj:

----- populara kanto
 ---_---- jupeto el marĉa planto

Solvo: kanzono, kan-zono

Sur freŝa herbejo **apud interdeklivajo**
 paŝtas sin nigra **rajdbesto**

Solvo: ĉe valo, ĉevalo

En la cerb' nur **tenta takto** estas ĉe
 studento.

Kaj la task' pri **eksponento** estas por li
 vento

Solvo: loga ritmo, logaritmo

Kaj nun solvu mem jenajn dusencaĵojn:

11. Kiu nin gaste vizitis, **MALKAŜU**
 kaj rapide **RIGARDI ALIRU**
12. En **ĉeekvatora** sfero
 Estas grandaj varmoj,
 kontraŭ sun' **ege incita**
 ŝirmas nin la palmoj.

Josef Cink



Solvu el du vortoj inter citiloj

1. Por dividi frazon, oni uzas “oblikvan strekon - komon”.
2. Por veturi pluen, ni devis “forigi - elimini” obstaklon sur la forjo.
3. Per biciklo li pli rapide “ĝisveturis - veturatingis” hejmen.
4. Parizo-Dakar estas “aŭtoentrepreno - aŭtokonkurso”.
5. Paska ovo estas bone “fritita - boligita”.
6. Multaj paroladoj “forkondukas - forlogas”

Jaroslav David

ALVOKO por renovigi la Esperantistan Pacmavadon

Publike estas konata la domaĝa indiferenco por la defendo de la paco. Pro politikaj renversoj okazintaj en Eŭropo, estiĝis granda vakuo por la organizado kaj funkciado de tutmonda pacagado, inkluzive en la Esperanto-sfero. Nepras almenaŭ provi, per praktika sindono kaj kunlaboro, la jam pruigitajn rezultojn tutmondajn.

La Hungara Sekcio de Mondpaca Esperantista Movado (MEM) - kiel grupo de Esperantistoj por la paco - aliĝis al organizaĵo: **Hungara Paco-Asocio** (adreso: **Hungarian Peace Association. H-1395, Budapest 62. PF. 440. Hungary**), en kies kadro plue funkcias ilia laboro, en favoraj cirkonstancoj.

Nur per kelkaj frazoj pri la aktivado en la kunlaboro: Post ĉesigo de la milito Jugoslavia-Kraino, ni estis en la fremda delegitaro, kiu povis viziti la urbon Vukovaro, kie ni transdonis ankaŭ medikamentojn al la tiea hospitalo por vunditoj, poste ni rajtis la unuaj pasadi libere en la ruinigitan urbon. Alie ni ekskursis kaj renkontis

pacaktivistojn el Aŭstrio, Ĉeĥio, Italio, Slovakio, Ukrainio, ktp. Ĉiujare ni kunlaboras kun la civilaj organizoj (CIVICUS), programoj kaj aliaj aranĝoj, ni aktivadas por aktualaj pacaj farotaĵoj.

Kun ĝojo ni mencias, ke grupe aŭ unusole aktivadas pacemaj esperantistoj ankaŭ el Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Francio, Italio, Jugoslavio; Vjetnamio kaj espereble ankaŭ en aliaj landoj.

Koncize do; estas ebloj, necesoj por la pacaj esperantistaj agadoj; ja estas bezone ne atendi, sed agi kaj semi, neniam laciĝante kaj konstante. Do, ne laciĝu kaj ne abdiku pri la nobla agemo de ideo por la paco, sed vi mem kreu kontaktojn viglajn kun ekzistantaj ebloj. Faru proponojn kaj akiru sperton eĉ vi mem, jam pri ekzistantaj spertoj kaj funkciaj celoj. Skribu esperante pri via opinio, al la adreso supre jam menciita.

Respondo aŭ interkontakto garantiata!

Kun la espero de la renovigo de la Esperantista Pacmovado, vian reciprokran laboron kaj utilan rezultojn ni antaŭdankas.

Budapeŝto, en januaro 2001
Dro. Imre Pethes pm.
Prezidanto de MEM

KULTURA SEMAJNO EN TOGOLANDA LERNEJO

La lernantoj ne nur lernu matematikon, historion, geografion, ktp, sed ili ankaŭ enprofundiĝu en ĉion alian, kio kontribuas al la disvolviĝo de la personeco. Tial la registaro iniciatis kulturen semajnon por la lernejoj en ties lernejoj. Dum la semajno la lernantoj faris multajn ludojn, muzikas, kantas, prezentas teatraĵojn, ekskursas, ktp. De la 9-a ĝis la 14-a de aprilo okazis la kultura semajno en CEG ANFAME, kolegio en la ĉefurbo Lome de Togolando. Ne pri la tuta evento temas tiu ĉi teksto, sed nur pri la kontribuo de Esperanto en ĝi.

En la kolegio estas Esperanto-grupo. Deko da lernejoj diligente lernas la internacian lingvon. Ili decidis prezenti la lingvon al siaj kamaradoj kaj la publiko invitita al la kultura semajno. Ili lernis kantojn, poemojn, kaj la 10-an de aprilo 2001 okazis la programero:

ELMONTRO DE ESPERANTO:

Antaŭ lernejestroj, instruistoj, lernantoj kaj aliaj loĝantoj ĉirkaŭ CEG ANFAME la Esperantistoj de la kolegio prezentis france Esperan-

ton. Per teatraĵeto prezentata en Esperanto ili gustumis la lingvon al la ĉeestantoj. Ne mankis kantoj kaj poemoj en Esperanto. Malgranda ekspozicio prezentigis periodaĵojn kaj ĉefajn vortarojn Esperantajn. La intereso de la publiko estis granda, ĉar ĉe la fino de la aranĝo, multaj ĉeestintoj impetis al la Esperanto-grupo por pli da informoj. Kaj tio ne estis la fino!

La 14-an de aprilo okazis pikniko en la kolegio ekde la dek-dua horo. Al la grupo estis disponigita klasĉambro, kie kolektiĝis ĉiuj esperantistoj de la kolegio kaj aliaj invititaj. Post manĝado, la grupo kantadis kaj dancadis ĝis vesperiĝo. Tiam ili disiĝis.

Tiel finiĝis kaj la kultura semajno kaj la partopreno de esperantistoj en la aranĝo. Tamen la grupo en la lernejo agadas plu. Ĝi do dankas al Dana Esperantista Fervoĵista Asocio, kiu per s-ro E Henning OLSEN sendis periodaĵojn por la ekspozicio. Tiu ĉi danko iras ankaŭ al ĉiuj aliaj kies sendaĵoj ne jam atingas la kolegion. La lernejo estas kontaktebla ĉe jena adreso:

CEG ANFAME, IREG GOLFE, B.
P. 80252, Lome-TOGO

(el RET-INFO)

Esperanto-Domo en Havano.

Klare mi hispane prononcis la longan stratadreson por la taksioŝoforo. "Esperanto" - li interrompis min, "mi scias." Post duonhora veturado tra la tuta urbo la taksio haltis ĉe bonaspekta, duetaĝa domo kun la enskribo ESPERANTO sur la muro.

Kuba E-Asocio disponas la domon ekde 1991 t.e. jaron post UK en Havano. Ene estas oficejo, biblioteko, instruejoj, manĝejo, gastĉambroj kun ĉiuj necesajoj por la sep salajritaj esperantistoj kaj aliaj. Estis granda plezuro renkonti krom esperantistoj-geamikoj ankaŭ ĉirkaŭ 20 lernantojn, kiuj estis studentaj Esperanton laŭ la programo de duniVELa kurso.

Ekster la domo troviĝas ĝardeno perfekta por festenoj kaj aliaj renkontiĝoj dum la varmaj, kubaj vesperoj! Ni gratulas kubajn esperantistojn al tia bona kaj granda ejo!

Anira Berg

AUTOKAROVÝ ZÁJEZD DO ZÁHŘEBU 20.-29. 7. 2001

V době uzávěrky ještě zbývají volná místa. Cena 6200 Kč zahrnuje 7 noclehů se snídaní. Odjezd z

Pardubic přes Vídeň, Graz, Maribor do Záhřebu. Kromě kongresového programu i několik výletů do okolí. Zájemci volejte pí. Rýznarovou na telefon 040/661 1941.

UMEA-kongreso en Kroatio

La 13-a Internacia Medicina Esperantista Kongreso (IMEK) okazos en la kroata Osijek (17.-21.7. 2001). La ĉefan prelegon prezentos prof. Saburoo YAMAZOE (*1908). UMEA proponas ampleksan 720-paĝan Anglan-esperantan medicinan terminaron (25 \$).

Himalaja renkontiĝo

Nepala Esperanto-Asocio invitas al la 4-a Internacia Himalaja Renkontiĝo 2002 inter la 26-a de februaro kaj la 8-a de marto.

*

18-a SOMERKURSARO de ESPERANTO

en Okcidenta Aŭstralio (5. 1. 2002 - 19. 1. 2002) kun internacia instruistaro preparos kursanojn por ekzamenoj kaj paroligos ilin.

Infanoj el Okříšky

En *Zpravodaj z Okříšek 1/2001* aperis artikolo ankaŭ pri Esperanto en la loka lernejo, kie d-ino Kamila Bártlová jam plurajn jarojn gvidas rondeton. En tutmonda konkurso pri fabelo ricevis bildeto de infanoj el Okříšky la duan premion. Parton de la rondeto vi vidas sube en foto.



Samideanoj el Ostrava baptas sian bildkarton (vidu p. 47)



NOVA STUDO DE CLAUDE PIRON

UEA eldonis kiel n-ro 46 en sia anglalingva serio "Esperanto Documents" 22-paĝan studon de Claude Piron, "Linguistic communication: A comparative field study" (Lingva komunikado: kompara praktika studo).

La studo de Piron temas pri kvar diversaj sistemoj de lingva komunikado en internaciaj organizaĵoj: tiu de Unuiĝintaj Nacioj k.a. organizaĵoj kun kelkaj laborlingvoj; tiu de multnaciaj kompanioj uzantaj unu nacian lingvon, plej ofte anglan; tiu de Eŭropa Unio uzanta la oficialajn lingvojn de ĉiuj membroj; kaj tiu de organizaĵoj uzantaj nur Esperanton. Ĉiuj sistemoj estas komparataj laŭ 12 kriterioj, kiel lernodaŭro, necesaj antaŭinvestoj, ne-egaleco kaj diskriminacio, kostoj de kunsidoj kaj dokumentado, perdo kaj distordiĝo de informoj, ktp.

Ĉe ĉiu kriterio la sistemoj ricevas poentojn de malavantaĝeco: 10 kaze de tre serioza malavantaĝo, 0 kaze de ne-ekzisto de malavantaĝo. Sekve, se iu sistemo estus totale malavantaĝa, ĝia poentosumo estus 120, dum nulo indikus ĉiurilate idealan sistemon. Kiel la plej malavantaĝa eliris el la studo la UN-sistemo (76 poentoj) kaj kiel la plej avantaĝa la Esperanto-sistemo (5). La EU-sistemo taksigis je 65 poentoj kaj tiu de multnaciaj kompanioj je 39.

La kajero kostas EUR 2,10 (plus imposto en EU kaj afranko).

eLibrejo

Jen titolo de nova biblioteko en Interreto, kiun prizorgas svedo Franko Luin. Aperas tie libroj, kiujn vi povas tiri al via komputilo, legi sur via ekrano kiel veran libron, eĉ kun ilustraĵoj, vi povas laŭplaĉe grandigi aŭ malgrandigi la altecon de la skribo konforme al viaj okuloj, sed ne eblas printi la tekstojn sur paperon, nek alimaniere prilabori. Tiel estas protektataj la aŭtoraj rajtoj de la aŭtoroj. La librejon vi povas trovi je la adreso:

<http://www.esperanto.se/eLibrej/o/index.html>

Enhavo de la eLibrejo::

JUNULARAJ KAJ INFANAJ LIBROJ

H. C. Andersen Fabeloj, **L. Frank Baum** La eksterordinara lando Oz, **Lewis Carroll** La Aventuroj de Alico, **Georg Fröschel** Ho ve, miaj ŝuoj!, **Oke Holmberg** Ture Svencion en Londono, **Astrid Lindgren** Emilo de Smolando, Pipi Strumpolonga, Ronjo, rabista filino, **Franjo Modrijan** Fabeloj, **Antoine de Saint-Exupery** La eta princo.

BELETRO: PROZO

Eposoj el antikva Ugarito, **Jakub Arbes** Rakontoj, **Frans G. Bengtsson** Orm la Ruĝa, **Miguel de Cervantes** Don Kihoto de la Manĉo en Barcelono, **K. G. Chesterton** La naiveco de pastro Brown, **Charles Dickens** Kristnaska kanto, **Jerome K. Jerome** Tri viroj en boato, **Alois Jirásek** Malnovaj mitoj ĉeĥaj, **Sten Johansson** Denaska kongresano, **Jaroslav Hašek** La brava soldato Ŝvejk, **Selma Lagerlöf** La infanoj de Betlehem, La junalino el Stormyr, La mono de sinjoro Arne, La ringo de la generalo, **Par Lagerkvist** Mariamne, **D. H. Lawrence** La virino, kiu forrajdis,

Johannes Linnankoski Batalo pri la domo Heikkila, **Artur Lundkvist** La volo de l' ĉielo, **Heinrich A. Luyken** Pro Iŝtar, **Eliza Orzeszko** Bona sinjorino, **Boleslav Prus** La faraono I, **Aleksandr Puŝkin** La neĝa blovado, **R. L. Stevenson** D-ro Jekyll kaj s-ro Hyde, **Theodor Storm** Imenlago, **August Strindberg** La insulo de feliĉuloj, La konscienco riproĉas, **Hjalmar Soderberg** La kiso, **Ivan Turgenjev** Patroj kaj filoj, **Mary Webb** Malbena kara ("dialekta" eldono), Veneno kara (norma esperanto), **H. G. Wells** Lando de blinduloj, La tempo-maŝino, **P. G. Wodehouse** La princo kaj Betty.

BELETRO: POEZIO

Magda Carlsson Sveda poemaro, **Raymond Schwartz** La stranga butikisto, **Ferenc Szilagy** Tra mia prismo, **Tomas Transtromer** La duonpreta ĉielo.

BELETRO: TEATRO

Arthur Azevedo Amo per proverboj, **Nikolao Hohlov** La morto de la delegito de UEA, **August Strindberg** Fraŭlino Julie, Pario, Pasko.

RELIGIO:

Biblio

CETERAJ LIBROJ:

Charles Baudouin La arto de memdisciplino: Psikagogio, **Louis Beaucaire** Kruko kaj Baniko en Bervalo, **Sven Bergman** Tra sovaĝa Kamĉatko, **Marjorie Boulton** Ne nur leteroj de plumamikoj, E. Drezen Zamenhof, **Ralph Harry** La diplomato kiu ridis, **Valdemar Langlet** Vojaĝaj impresoj, **James Vasco Milanez** La ĉela telefonsistemo, **Marc Picasso** Pastajo - konsideroj kaj historio, **Platono** Kratilo, La respubliko, **János Sarközi** Optiko, **L. L. Zamenhof** Esenco kaj estonteco de la lingvo internacia.

Biblioteko de Don Harlow

Pli ampleksan, sed malpli homogenan Esperantan bibliotekon en la reto administras usonano Don Harlow. En sia paĝo li kolektas informojn kaj ligojn al ĉiuj literaturaj verkoj en Esperanto, kiuj en Interreto aperis tra la tuta mondo.

En lia listo vi povas trovi ĉirkaŭ du mil verkojn, sed ĉar ilin prilaboris diversaj esperantistoj, aperas apud si aŭtoroj mondfamaj kaj nekonataj, mallongaj poemoj apud longaj romanoj, simplaj tekstoj apud estetike aranĝitaj libroj. Foje aperas kompleta verko, foje nur fragmento, foje x-kodo, foje ĉapelitaj literoj ktp.

La verkoj estas principe dividitaj je originale verkitaj en Esperanto kaj je tradukoj. Tiuj plue je anoni-maĵoj kaj je konataj aŭtoroj, poste en plurajn grupojn laŭ la alfabeto (A, B, C-F, G-H, I-L, M, N-R, S-T, U-Z). Do oni povas facile trovi "sian" aŭtoron, aŭ konvinkiĝi, ke li ankoraŭ ne estas en la reto reprezentita.

Bedaŭrinde ni ne povas ĉi tie citi ĉiujn verkojn kaj ĉiujn aŭtorojn. Ni prenu aŭtorojn (kiel ekzemplon) el tradukoj sub G-H: Gansovskij, García Lorca, GE Biĝoŭ, GIM

Dongmjong, GIM Dongni, GIM Mison, Ginsberg, Giordiani, Girginov, Girleanu, Gnedic, Gobineau, Goethe, Gogol, Goldschmidt, Gonzaga, Gorki, Grass, Gerebenĉikov, Gregori, Grimm, Goenborg, Guberman, Guerra Junqueiro, Gulia, Gulik, Gullberg, Gulyás, GUO Moruo, Gurganus, Gustavsson, HA Ĉijong, Hadewijch, Hamkjong, Hale, HAN Jongun, Harburg, Hardy, Harlow, Harmaja, Harry, Hausin, Heine, Heltai, Hely, Hemmer, Henry, Herrmann, Hesse, Hildesheimer, Hipokrato, Hoeg, Holmberg, Hood, Hooft, Horansky, Horatius, Hrubín, HU Gong, Hughes, Hugo, Hunt, Huygens.

Apud famaj aŭtoroj tie aperas por ni ne konataj, sed estas tie ankaŭ nemultaj ĉeĥaj aŭtoroj, ne ĉiam enretigitaj de ĉeĥaj esperantistoj. Simila situacio estas sub aliaj literoj de la alfabeto. De kelkaj aŭtoroj aperis nur unu verketo, dum de aliaj multaj pecoj.

La listo do impresas iomete pelmele, tamen ĝi estas ekstreme grava por la prestiĝo de nia lingvo, ankaŭ por altiĝo de novaj esperantistoj, kiuj amas literaturon. Kun evoluo de Interreto la verkoj certe ricevos pli belan formon - ĉefe, ke ili estos enkomputiligitaj kaj enretigitaj.

BRUSELA OFICEJO

En pasinta novembro okazis, kiel vi scias, kunveno en Roterdamo ĉe la Centra Oficejo de UEA de eŭropaj esperanto-aktivuloj. Unu el ĉefaj temoj estis la propono starigi en Bruselo Oficejon de EEU.

Poste la temo estis longe kaj vaste debatata per e-poŝta korespondado inter la EEU-aktivuloj, kaj esploroj estis surloke faritaj, pri kostoj kaj eblecoj. La Oficejo povus funkcii kiel oficiala sidejo de EEU kaj samtempe kiel oficejo de la "Laborgrupo pri la lingva problemo en Eŭropo". La oficejo povus starti je ia difinita minimuma nivelo, por kreski poste laŭ la kapabloj kaj la necesoj.

Sed la bazo de ĉio estas financado. Do ni eliru el la diskutoj kaj komencu konstrui. La estraro de EEU alvenis al la decido lanĉi la ĉi suban alvokon.

ALVOKO

NI KONSTRUU!

Komence de la venonta jaro ekcirkulos en dek du landoj de la Eŭropa Unio samaj monbiletoj kaj

samaj moneroj. Tio konkrete montros, kiom multe nia ĉiutaga vivo, de ni civitanoj de EU, estas ligita al komunaj institucioj. Ankaŭ ni eŭropaj esperantistoj estos pli kunligitaj. Kaj tio pli bone montras la neceson de komuna Esperanto-agado en Eŭropo. EEU celas ĝuste tion, nome antaŭenigi komunan agadon. Por ke la Esperanto-agado eŭroprnivela estu pli efika, estas necese ke EEU estu videble reprezentata tie, kie la ĉefaj organoj de Eŭropa Unio troviĝas, nome en Bruselo. La EEU-estraro decidis provi starigi EEU-oficejon en Bruselo, kiu ebligu pli rektajn kontaktojn kun la ĉefaj eŭropaj instancoj, t.e. la Komisiono kaj la Parlamento, kaj zorgu informadon de la tre multaj ĵurnalistoj ĉiulandaj, kiuj laboras en la "Eŭropa ĉefurbo". Minimуме tia oficejo, kiu devus esti ankaŭ la oficejo de la Laborgrupo pri la Eŭropa Lingvoproblemo, devus funkcii almenaŭ tri duontagojn semajne kun unu deĵoranto; pli ambicia celo estas atingi plentempan funkciadon kun salajrata persono plus unu aŭ pluraj helpantaj aktivuloj. La ĉefa problemo estas la mono. Francoj diras ke "estas la mono tio, kio faras la militon", kaj tio validas ankaŭ por nia paca batalado.

Por certigi longedaŭran agadon de la oficejo, oni bezonas havi kapitalon, kies rento kovru la kostojn de la oficejo. Ĉu eŭropaj esperantistoj kapablos realigi tion? Jen valora defio! La estraro de EEU lanĉas alvokon al ĉiuj eŭropaj esperantistoj, al ĉiuj kiuj konscias pri la graveco de la eŭropa agad-kampo por la sukceso de la internaci-lingva ideo, al la landaj asocioj, al la internaciaj esperanto-organizaĵoj, por ke ili kontribuu al starigo de "Fondaĵo Eŭropo", en konto ĉe UEA. Provizore, dum la formala starigo-procedo de la Fondaĵo, vi rajtas sendi viajn kontribuojn al la konto eece-p de EEU ĉe UEA, indikante la celon, t.e. "Brusela Fondaĵo".

La fondaĵo estos estrata de la EEU-estraro kaj ĉiuj kontribuoj estos diskonigataj pere de tiu ĉi bulteno kaj de la Esperantaj informiloj. Ĉiu kontribuanto ricevos tiun ĉi bultenon ankaŭ en papera formo, sen plia pago.

Do, sciigu al ni ĉu Eŭropo estas vere grava por vi. Investu en Eŭropon! Ni atendas, ke ĉiu landa asocio iniciatu kolektadon inter siaĵanoj kaj forte apogu ĝin. Dankon.

La prezidanto de EEU
Umberto Broccatelli
(ret-info)

Gloraj verkoj en Esperanto

La eldonejo Sezonoj en Jekaterinburg riĉigas nian literaturon per veraj juveloj.

La Hobito, aŭ tien kaj reen de J. R. R. Tolkien (tr. Ch. Gledhill kaj W. Auld) estas mirfabelo, kiu glorigiĝis la aŭtoron kaj antaŭis lian trilogion *La mastro de l' ringoj*. Maljuniĝanta fraŭla hobito (nano) estas devigita entrepreni aventurplenan marŝon tra nigra arbaro por savi la mondon.

Resurekto de Lev Nikolajeĉ Tolstoj, la lasta el liaj tri grandaj romanoj (*Milito kaj paco*, *Anna Karenina*), kritikas la tribunalan maljustecon.

Maigret hezitas de Georges Simenon enkondukas en nian literaturon pluan verkon de detektiva ĝenro.

Malvivaj animoj estas ĉefverko de Nikolaj Vasiljeviĉ Gogol, kies *Revizoro* en traduko de Zamenhof furoras en Esperantujo ekde la komencoj de la movado. La romano pri ruza Ĉiĉikov, kvankam nefinita, fariĝis unu el plej gloraj verkoj de la rusa literaturo. Nun ĝi aperas en serio Oriento-Okcidento verŝajne kiel unu el plej gravaj literaturaj eventoj en Esperantujo.

Hospodaření ČES

kontrola rozpočtu 2000 a návrh na 2001 (sestavil P. Polnický)

	Rozpočet 2000	skutečnost	návrh 2001
PŘÍJMY:			
Členské příspěvky	100 000.-	73 200.-	100 000.-
tržby libroserva	30 000.-	14 123.-	20 000.-
písemné kursy	5 000.-	10 660.-	10 000.-
Starto - předplatné	1 000.-	792.-	1 000.-
úroky v bance	2 000.-	1 897.-	2 000.-
dary členů	20 000.-	2 150.-	20 000.-
dividendy	2 000.-	-	-
konference ČES	60 000.-	61 750.-	70 000.-
KAEST (v roce 2001 OSIEK)	5 000.-	--	5 000.-
prodej akcií	82 000.-	2 111.-	10 000.-
ostatní příjmy (včetně IFEF)	33 000.-	97 416.-	97 000.-
konverzační kurzy	---	16 229.-	40 000.-
půjčka KAVA-PECH	--	20 000.-	---
Celkem	340 000.-	297 468.-	375 000.-
VÝDAJE:			
režijní materiál	20 000.-	5 742.-	7 000.-
Libroservo - náklady	10 000.-	6 752.-	7 000.-
cestovné	40 000.-	26 061.-	25 000.-
poštovné	40 000.-	11 302.-	15 000.-
telefon + internet	15 000.-	9 777.-	15 000.-
funkční příspěvky	7 000.-	4 080.-	7 000.-
nákup služeb	5 000.-	38 965.-	40 000.-
daně a poplatky	7 000.-	6 716.-	7 000.-
konference ČES	60 000.-	51 598.-	60 000.-
Starto - tisk a expedice	100 000.-	76 820.-	90 000.-
písemné kursy	6 000.-	1 919.-	2 000.-
odměny	10 500.-	---	5 000.-
muzeum Česká Třebová	2 500.-	2 500.-	2 500.-
podpora sekcí a skupin	10 000.-	---	---
ostatní výdaje	7 000.-	41 180.-	---
nákup inventáře	---	10 940.-	---
nájem Běchovice	---	20 000.-	27 000.-
repre + dary	---	5 050.-	5 500.-
granty	---	6 849.-	---
vracená půjčka KAVA-PECH	---	---	20 000.-
konverzační kurzy	---	17 320.-	40 000.-
Celkem	340 000.-	343 575.-	375 000.-

Malá rekapitulace

Náměstek ministra školství,
mládeže a tělovýchovy
doc. Dr. Václav Šenkýř, Csc.

V Praze dne 11. Ledna 1990
č.j.: SM 4425/89-210

Vážený pán
p. ing. Petr Chrdle, Csc.
Předseda Českého esperantského svazu
Jilská 10
110 01 Praha

Vážený pane předsedo.

z pověření ministra školství, mládeže a tělovýchovy prof. MUDr. Milana Adama, DrSc., k Vašemu dopisu ze dne 13. 12. 1989 sdělujeme:

Skutečnosti uváděné ve Vašem doporučení vyučovat esperantu v našich školách jsou podnětné a budou posouzeny a zváženy při přípravě návrhu nepovinných předmětů v nových učebních plánech pro střední školy, zejména gymnázia.

O výuce esperanta v základních školách se v současné době neuvažuje, v budoucnu je možno uvážit jeho zařazení rovněž mezi nepovinné předměty.

Obecně můžeme konstatovat, že pro zavedení esperanta jako jednoho z volitelných jazyků v našich základních a středních školách nejsou zatím vytvořeny potřebné podmínky - učební osnovy, učebnice, chybí rovněž kádrové zajištění, proto zařazení zvažujeme pouze v souladu s podmínkami a možnostmi, které lze v nejbližší budoucnosti zajistit.

Ministerstvo doporučuje, aby se Český

esperantský svaz cílevědomě zaměřil na získávání zájemců z řad žáků našich škol o znalost esperanta a prostřednictvím svých odboček se školami přímo spolupracoval i v oblasti zájmové činnosti žáků.

S pozdravem

V. Šenkýř

V Učitelských novinách č. 31 z 28.8.1991 pak vyšla tato výzva školám:

Pokud se na školy obrací organizace esperantistů se žádostí o vytvoření zájmové skupiny žáků pro výuku esperanta, ministerstvo školství, mládeže a tělovýchovy ČR doporučuje jejich žádostem vyhovět a poskytnout pro tuto činnost místnosti.

Školy samy mají zájem o jakoukoliv zájmovou činnost pro děti. Problém je spíš v tom najít lidi, kteří s dětmi umí pracovat a jsou ochotni jim pravidelně věnovat hodinu či dvě týdně. Některé pokusy ztroskotaly na tom, že rodiče dětem esperanto zakázali a zapsali je do angličtiny nebo němčiny, výjimečně do francouzštiny. Volitelnými předměty na školách jsou i španělština a ruština, avšak téměř nikde není tato možnost využívána pro nezájem dětí a rodičů. Vnucovat přitom žádný jazyk nelze ani učitelům.

Je třeba získávat děti a rodiče, ne ministerské úředníky. Zatím víme jen o třech školách, kde dětské kroužky fungují (Č. Třebová, Okříšky, Ratíškovice). Nedostatek učebnic pro nejmenší se snaží doplnit naše ped. sekce přípravou nové učebničky. Ostatní záleží na členech v jednotlivých místech.

KALENDARO 2001

9.2.	Esperantista balo en Ĉ. Třebová
26.2.-2.3.	Ekspozicio en Vyškov
20.-22.4.	Hlaváček en Ratíškovice
23.-29.4.	Seminario en Skokovy
12.-19.5.	IFEF-kongreso en Tábor
26.5.	100 jaroj de EK Brno
26.5.	Renkontiĝo en Polička
1.-3.6.	Naturamika renkontiĝo en Plavy
1.-3.6.	E-mentál en Meziříčko
8.-10.6.	Paroliga kurso + ekzamenoj
9.6.	Ĉeĥa-saksa tago en Pírna
1.-14.7.	1-a etapo de SET Lančov
14.-20.7.	OSIEK-konferenco Strážnice
14.-21.7.	Bus-ekskurso al Zagrebo (IKUE)
15.-28.7.	2-a etapo de SET Lančov
20.-28.7.	Bus-ekskurso al Zagrebo (AEH)
1.-5.8.	90 jaroj de EK Poděbrady
4.-11.8.	Katolika E-Tendaro Sebranice
29.7.-11.8.	3-a etapo de SET Lančov
10.8.	Renkontiĝo de eks-Lančovanoj
12.-18.8.	Ripozsemajno en Lančov
19.-29.8.	Nekvasovy
2.-5.9.	Antaŭ-IBIRE en Dobřichovice (por biciklistoj)
5.-9.9.	IBIRE en Doksy (Internacia Biciklista Renkontiĝo)
28.-30.9.	Kultura Festivalo en Ústí n. L.
10.-14.10.	Klerigaj tagoj Jeřichovice
19.-21.10.	8-a konferenco de ĈEA en Poděbrady
oktobro	Aŭtuna semajno en Skokovy
8.12.	Ĉeĥa-Saksa tago
decembro	E- Silvestro en Ĉ. Třebová*

NEPOUŽÍVEJTE

nálepky se starou adresou svazu (box 1060 či dokonce Jilská 10) ani jako lepička, protože pak na tyto adresy chodí pošta, která se ztrácí. Žádáme členy, aby nálepky zničili a u ostatních materiálů nalepili současnou adresu se sídlem v Poděbradech!!!

Důležitá v ý z v a:

Český esperantský svaz má vlastní internetové stránky. Svoji propagační roli mohou plnit pouze tehdy, když jsou aktuální, t.j. odpovídají skutečnosti. V opačném případě (a to je současný stav) spíše svazu a tedy i esperantu škodí!! Žádáme tedy všechny funkcionáře klubů, kroužků i sekcí, aby pravidelně hlásili veškeré změny tajemníkovi svazu, který je oprávněn úpravy zajistit. Reagujte okamžitě - děkujeme!!! Výbor ČES.

Upozornění:

Na účet svazu došlo několik plateb bez určení plátce. Jedná se o tyto platby a den připsání: 200 Kč (2.3. pošt. poukázkou), 100 Kč (12. 3. KB), 200 Kč (27. 3. spořitelna Domažlice). Pokud jste stejnou částku platili v uvedené pokladně - ozvěte se!!! Je bezpodmínečně nutné uvádět jméno plátce!!!!

Také za členství v UEA máme několik neidentifikovatelných plateb: 420 Kč (19. 12. Praha 3), 1050 Kč (20. 12. Praha), 420 Kč (6. 1.), 1050 Kč (7. 1.), 420 Kč (10. 1.).

Informujte hlavní delegátku Lucii Karešovou na čísle 02/22780677 večer. Pro rok 2001 se za individuální členy UEA přihlásilo 59 esperantistů v kategoriích MJ a MA.

Jak platit svazu

Nejlevnější způsob platby pro Vás i pro svaz je přímá platba u pokladny v kterékoliv pobočce Komerční banky. Vyplníte pokladní složenku (jsou v pokladně k dispozici) pečlivě ve všech kolonkách - tedy: měna účtu: Kč, č. účtu: 3330-021/0100, měna hotovosti: Kč, částka: slovy kolik platíte, jméno a příjmení, adresa, RČ (nemusí být). Pokud platíte za kroužek (klub, sekci), vyplňte stručně EK (sekce železn.) a místo do kolonky - vklad jménem. Velmi důležitý je pro určení platby variabilní symbol - číslo (5-místné), které je buď stálé (viz seznam) nebo bude vždy uvedeno na pozvánkách nebo na inf. článku ve Startu. Konstantní symbol je vždy 0379. Seznam čísel:

06940 ČES

06941 UEA

06942 předplatné Starta bez členství

06943 dary ČES

50100 sekce mládeže

50200 sekce železničářů

50400 sekce pedagogická

50401 písemný kurs začátečníci

50402 písemný kurs pokročilí

50403 členství ILEI

50500 sekce přátel SAT

50600 sekce šachistů

50700 sekce sběratelů

50800 sekce nevidomých

50900 sekce zdravotníků

51000 sekce křesť. esp. KELI

51100 sekce katol. esp. IKUE

70100 komise pro tisk a inf.

80200 ediční fond

80300 propagace v tisku

80400 fond Tilio

Výzva: Pokud jste poukázali platbu a nejste si jisti, zda jste řádně vyplnili své jméno, napište tajemníkovi svazu, kdy a kolik jste platili - máme více než 20 neurčených plateb, a to na různé akce, členství ČES, ale i na členství UEA.

Důležité sdělení: vzhledem k výše uvedené změně platby NEBUDE svaz rozesílat složenky (děkujeme za pochopení).

Periodikum Českého esperantského svazu (32. ročník)

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@clavis.cz; www.clavis.cz/starto**

**Členská evidence a změny adres:
Pavel Polnický, ČES**

**Presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
(32-a jarkolekto)**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ
rekte ĉe nia Asocio**

Abonprezo: 9 eŭroj

(se aerpoŝte: + 2 eŭroj)

**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, e-mail: starto@clavis.cz;**

www.clavis.cz/starto

Presis: OPATISK Opava

ISSN 1212-009X